

Sufikso –**id**/o

La sufikso –**id**/o esprimas ĝeneralan ideon de naskiteco.

Sufiksa rolo 1:

Pri homoj, teritorio aŭ gento, sen ia nuanco pri aĝo, ĝi signifas **filo de** aŭ **devenanto de**.

	filo de	devenanto de
reĝo	reĝ ido	
princo	princ ido	
grafo	graf id ino	
homo	hom ido	
Napoleono		napoleon ido j
lando		land ido j
latino		latin id aj lingvoj

Sufiksa rolo 2:

Pri bestoj aŭ vegetaĵoj, ĝi signifas **juna naskito ne matura**.

	bestoj	vegetaĵoj
ĉevalo	ĉeval ido	
koko	kok ido	
ŝafo	ŝaf ido	
bovo	bov ido	
birdo	bird ido	
planto		plant ido
branĉo		branĉ ido j
arbo		arb ido

Ido: La sufikso –**id**/o memstariĝis kun la signifo infano, filo, posteulo aŭ disĉiplo.

Geedzoj kun multaj **ido**j.

Ni ĉiuj estas la **ido**j de Adamo.

La **ido**j de sankta Bruno.

La **id**aro de Adamo kaj Evo.